# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto, n-ro 1
januaro 1989

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Monique Caestecker, Kerkstraat 66, B-9940 Sleidinge.

**ESTRARO**

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprez., Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 68.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

**KOMISIONOJ**

**Financoj:** Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado:** Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo:** Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo:** Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo:** Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado:** Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

**Malferma estrarkunsido de FLEJA je 18/12/88 ĉe Patrick Haerick en Gentbrugge**

Ĉeestantoj: An Alberto, Carl Deseure, Patrick Haerick, André Ruysschaert, Eddy Van den Bosch kaj Jean Pierre VandenDaele.
Senkulpigis: Stefaan Cottenier kaj Vera Van Boxel.

Komenco: 10h30.

<u>1. 11a semajnfino en Westmalle</u> (Patrick)
Estis malpli da aliĝintoj kaj la organizado estis malpli bone antaŭpreparita tiel la programa kvalito malkreskas ! Subvencioj ne jam alvenis. Estas malgajno de 14000 frankoj pro alveno de infanoj kiuj pagis minimuman kotizon. Tamen pere de la antaŭvidita subvencio la gajno estu 2000 frankoj. La kotizpago germana de la antaŭa semajnfino daŭre ne alvenis tial Eddy esploros tion dum la IS. Se eblas okazos sekvonta semajnfino en Lokeren aŭ denove en Waasmunster. Eddy esploros la eblecojn (ejo kaj kunlaborontoj).

<u>2. Interŝanĝoj en IJK-Zagrebo</u>
Ĝis nun ne jam alvenis leteron de LKK aŭ TEJO rilate al repago de 3 IJK-kotizoj interŝanĝe kun jugoslavoj. Tial Jean Pierre skribos leteron al LKK kaj kopie al TEJO por scii kiel la afero progresis.

<u>3. Financoj</u> (Eddy)
Ĉiuj kontoj estas je nomo de Eddy krom la poŝta kies instanco nepre volas kopio de la ŝtatgazeto kun la nova estrara situacio, do ili atendu ĝis nia ĝenerala jarkunveno !
Verda Konto de FEL: precipe Patrick timas ke FLEJA perdos sian monon se FEL ne povos repagi pro financaj problemoj.
Dum nia ĝenerala jarkunveno ni prezentos la proponon por altigi la kotizon subtenan al 1000 frankoj (por havi saman kotizon kiel FEL).

<u>4. 1989</u>
Nia ĝenerala jarkunveno okazos en Bruĝo dum la aranĝo de tago de internacia amikeco je 26/2/89 en hotelo Climat. Nia dua kursotago en Kortrijk okazos je 4/3/89 de la 10a ĝis la 17a horoj kun tagmeza paŭzo, instruisto estos Petro de Smedt.
Jean Pierre sendos invitilojn al ĉiuj mebroj kaj kluboj por ambaŭ aranĝoj kune kun rememoriga letero por tiuj kiuj ne jam pagis ilian membrokotizon por 1989.
Estontaj kongresoj: paska renkontiĝo en Baarle-Hertog/Nassau pri "Belgaĵoj" kaj IJK-Kerkrade pri "Transporto". Eddy ŝatus aranĝi biciklan ekskurson kun kampadebleco ĉe li por UK-aliĝontoj. Por tiuj kiuj ne biciklemos ni esploros dum nia kursa tago ĉu eblos restadi en Kortrijk dum la IMEA-kongreso tiea.

<u>5. Diversaĵoj</u>
Principe ni jes volas ĝemeliĝi kun zairaj junuloj sed ni ne tuj vidas praktikajn eblecojn.
Same kiel okazis en Francio, Germanio kaj Norvegio ni klopodos aperigi mencion de Pasporta Servo en la eldonaĵo fervoja Interrail pere de prezentekzempleroj tiulandaj kiujn Eddy havigu dum IS. Ni petos helpon de BEFA.

Fino: 12h30. Protokolanto: Jean Pierre VandenDaele.

Woont U in:
- ☐ de agglomeratie Brussel
- ☐ Vlaams Brabant, behalve Brussel
- ☐ de agglomeratie Antwerpen
- ☐ de rest van de provincie Antwerpen
- ☐ de agglomeratie Gent
- ☐ de rest van de provincie Oost-Vlaanderen
- ☐ de provincie West-Vlaanderen
- ☐ de provincie Limburg
- ☐ Wallonië
- ☐ elders

Welk onderwijs genoot u:
- ☐ lager
- ☐ lager middelbaar
- ☐ lager technisch
- ☐ hoger niet-universitair
- ☐ hoger middelbaar
- ☐ hoger technisch
- ☐ universitair

Welke talen kent u reeds voldoende voor praktisch gebruik (meerdere antwoorden mogelijk):
☐ Nederlands ☐ Frans ☐ Engels ☐ Duits
☐ andere nl. ..............................................

Leerde u reeds Esperanto: ☐ ja ☐ neen

Indien ja, gelieve dan ook de volgende vragen te beantwoorden:

Spreekt u Esperanto: ☐ goed ☐ middelmatig ☐ helemaal niet.

Waarom leerde u Esperanto: (max. 3 antwoorden)
- ☐ uit interesse voor talen
- ☐ uit nieuwsgierigheid
- ☐ omdat Esperanto internationaal is
- ☐ omdat Esperanto gemakkelijk is
- ☐ omdat Esperanto neutraal is
- ☐ uit leergierigheid
- ☐ om contacten te leggen
- ☐ om mee te werken aan een oplossing voor het internationale talenprobleem, vrede, taalimperialisme, e.d.

Gebruikt u het:
- ☐ dagelijks
- ☐ maandelijks
- ☐ nooit
- ☐ wekelijks
- ☐ nu en dan

Wanneer leerde u Esperanto: .................. jaar geleden.

## Enquête-formulier

Om de informatie-campagnes van de Vlaamse Esperantobond beter te richten en een groter rendement te bereiken, vragen we u de volgende vragen te beantwoorden. Wij wijzen erop dat de antwoorden uiterst discreet worden behandeld (zij zijn bovendien anoniem) en enkel de Esperantobeweging ten goede komen. Voor een goed resultaat is het belangrijk dat **iedereen** zijn antwoord terugstuurt. Het resultaat publiceren we nadien in *Esperanto Panorama*.

Per vraag is maar één antwoord mogelijk, tenzij anders aangegeven.
Stuur uw ingevuld formulier vandaag nog terug aan:

Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen,
of Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee.

Geslacht ☐ vrouw ☐ man

Leeftijd ☐ 15-17; ☐ 18-20 ☐ 21-24; ☐ 25-34;
☐ 35-44; ☐ 45-54; ☐ 55-64; ☐ 65 en ouder.

Woont U in:
- ☐ A een weelderige woning;
- ☐ B een burgerwoning;
- ☐ C1 een bescheiden woning;
- ☐ C2 een gehuurde of heel bescheiden woning.

Aantal personen in uw gezin (uzelf inbegrepen):
☐ 1 ☐ 2 ☐ 3 ☐ 4 ☐ 5 of meer

Wat is uw beroep:
- ☐ hoger en middenkader;
- ☐ bediende;
- ☐ ambtenaar;
- ☐ handelaar;
- ☐ landbouwer;
- ☐ arbeider;
- ☐ ambachtsman;
- ☐ huisvrouw/man;
- ☐ zelfstandig of vrij beroep;
- ☐ gepensioneerd;
- ☐ werkloos;
- ☐ lerares/leraar: ☐ talen ☐ ander vak ☐ beide
- ☐ student of leerling: richting: ....................................
- ☐ rentenier;
- ☐ ander nl. ....................................................

*La interhomaj Filatoj en FEL*

## NOVA REALISMO.

Nia socio manifestas admiron por sukcesaj gvidantoj. En labilado ili ofte ricevas la epiteton "granda realisto". La ĝenerala bildo de tiuj homoj estas pli malpli jena: ege laborema viro, kiu kvazaŭ neŭroze ligiĝas al sia firmao aŭ movado, ne timas altrudi siajn opiniojn kaj dezirojn kaj ofte fariĝas kolera, minacas kaj eĉ ĉantaĝas kiam io ne funkcias laŭplaĉe. Tiaj homoj estas la herooj de multaj popularaj romanoj kaj televidprogramoj, kiel Dallas, Brandenburgs, Château Vallon ktp. La ĉefrolantoj estas sukcesaj komercistoj, kiuj aliflanke stumblas en siaj familiaj rilatoj, kaj ne sukcesas trovi pacon en sia ĉirkaŭaĵo. Kelkajn sukcesulojn kiujn mi persone konis, baraktis - meze de la admiro - kun la sento ke ili estas komplete malsukcesintaj.

La publiko apenaŭ konsciiĝas, ke intertempe formiĝis nova generacio da sukcesuloj. Ili malkovris, ke supre menciita tradicio de impulsiva agado ne ĉiam estas la plej efika. Ili ne manifestas tiom da emocioj, sed agadas multe pli trankvile. Ĉu tio signifas ke al tiuj novaj gvidantoj mankas emocioj? Certe ne. Sed la emocioj ja estas pli proporciaj al la realo. Se gvidanto grumblas ĉar iu membro de asocio ne plenumis sian promeson, tio ŝajnas tute akceptebla reago. Sed se iu volas turni la dorson aŭ eĉ bojkoti movadon ĉar unu faceto de la agado ne plaĉas, tio estas ekstermezura. Se iu protestas, ĉar li havas kritikojn pri elekto de nova estraro, tio estas pli ol pravigebla. Sed se iu volas kaŭzi skismon pro tio, tiu konduto komplete maltrafas la celon de agado. La novspecaj gvidantoj malkovris ke ne necesas streĉitaj rilatoj, kun multe da timigo ĉe la subuloj, por akiri efikan rezulton.

Kiel eblas ke la ĝenerala konduto de gvidantoj tiom esence ŝanĝiĝis en la daŭro de nur unu generacio (kaj sekve ankaŭ kaŭzas malkonsenton inter nov- kaj malnovstilaj gvidantoj)? Ĉar sociologoj kaj psikologoj atentigis nin je tio ke emocio estas esprimo, ke la realo eskapis nin. Kiam ni ekzemple koleregas kontraŭ homo, tio ja signifas ke ni estas senpovaj kontraŭ lia konduto kaj eĉ profunde timas ĝin. Ni sentas frustraciojn, stomakdoloron, nervoziĝon aŭ sendorman nokton, kiam ni troviĝas antaŭ por ni nebrideblaj situacioj.

Ju pli ni konsciiĝas pri ĉio tio, despli facilas kompreni la ĝustajn mezurojn de malkonsentoj. Ju malpli da pendantaj konfliktoj ekzistas, ju malpli grandaj fariĝas iliaj dimensioj, despli da energio restas disponebla por celtrafa agado!

Ivo Durwael.





"Stafeto"-serio prezentas:

## Ĉu rakonti novele?

**Johán Valano**

Preskaŭ ne necesas reklami tiun ĉi libron.
Dek unu mallongaj rakontoj krimaj, en kiu Jano Karal, la valana detektivo, en profesie lerta kaj lingve klara stilo, solvos saman kvanton da fiaj krimoj.
Eĉ al komencantoj oni povas demandi: Ĉu legi senhalte?

**Ĉu rakonti novele?** 144 paĝoj. 370 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio




antaŭulo de l' "Stafeto"-serio:

## Jaĥto veturas for... kaj veturigas la **morton**

**Deck Dorval**

"Mi kore invitas vin al agrabla surmara vojaĝo, enŝipe de mia privata jaĥto 'Marfalko'..."
Ĉu vi kredus ke tia mesaĝo ekmoviĝas aventuron en kiu komplika krimo estas solvenda? Laŭ la tradicio de la plej bonaj krimromanoj, Deck Dorval rakontas neverŝajnan historion.

**Jaĥto veturas for, kaj... veturigas la morton** 190 p., 340 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio



## *Ŝanco por Feliĉo*

Se pezas la vivo sur viaj ŝultroj; se vespere, vi volas kviete ripozi kaj iomete pripensi vian situacion; se vi serĉas ŝancon por esti feliĉa eĉ dum malfacila vivo, la plej sukcesa libro de Phil Bosmans, tradukita jam en 14 lingvojn kaj eldonita en 3 500 000 ekzempleroj, helpas vin.

96 paĝoj. Broŝurita. Prezo: 395 BEC + afranko. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



"Stafeto"-serio prezentas:

## Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas

**Manjo Austin**

Kiam denove edziniĝas ŝia patrino kaj ili translokiĝas al nova hejmo, malfermiĝas por Maureen nekonata mondo plene de novaj samfamilianoj. Ekiro en la profesian vivon eĉ pli malfaciliĝas la ŝanĝon. En rakonto, kiu sursceniĝas en irlanda ĉirkaŭaĵo, ni sekvas ŝian kreskon al adolteco.

**Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas** 128 p., 330 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio




"Stafeto"-serio prezentas:

## murdo en esperantujo

**Daniel Moirand**

Kviete fluetas la kluba vespero, kiam subite malfermiĝas la pordo kaj envenas nekonata viro. Kiam li atingas la tablon, li teren kolapsas. Morta!...
Pro tiu okazaĵo leŭtenanto William Hammerkopf eniras la Esperanto-mondon. Ĉu li trovos tie nur morton kaj pereon?

**Murdo en Esperantujo.** 156 paĝoj, 390 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio




"Stafeto"-serio prezentas:

## *Beletro, sed ne el katedro*

*Gaston Waringhien*

Ĉu vere ekzistas esperanta literaturo? Ĉu eĉ ekzistas esperanta literaturscienco?
La nestoro de l' esperantaj literatur-istoj instruos, en agrabla, klara, prilaborita stilo, pri la atingaĵoj de esperantaj verkistoj kaj tradukistoj. Fakte temas pri simplaj klarigoj de altnivelaj artaj rezultoj.

**Beletro, sed ne el katedro:** (reviziita eldono de *Eseoj I*) 263 p., 630 BEC + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

## FEL: RAPORTO DE LA ESTRARKUNSIDO DE 89 01 14

**Ĉeestas**: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Edward Symoens, Alex Humet, Hilde van Ingelgem kaj Paul Peeraerts. Petis senkulpigon Jos Vandebergh.

1. **Rezulto de 1988**: La finaj ciferoj de 1988 ankoraŭ ne estas konataj, sed jam nun montriĝas, ke la deficito pro la perdo de UEA kiel kliento ne estos tiom granda kiom antaŭvidita. La nunaj prognozoj varias inter tricent kaj kvincent mil. Estas tute klare, ke la aĉeto de nova presmaŝino pozitive influas la spezokonton. Decembro jam estis bona. La aŭguroj por 1989 do ankaŭ estas kontentigaj.

2. **Eldonaj planoj**: Momente deko da eldonaĵoj estas preparataj kaj kelkaj atendas ankoraŭ decidon.

- *Oktavia* de Seneko (trad. Berveling) estas finkompostita kaj tuj presota. Ĝi estos n-ro 9 en la "Stafeto"-serio.
- *Kromosomoj* de Lorjak estas grandparte preta kaj povus esti eldonita.
- *La nova realismo* de Vogelmann estas kompostata.
- *Internacia kuirlibro* atendas ankoraŭ kompostadon de kelkaj eroj kaj decido pri la ekstera aspekto de la libro.
- *La fundamento sub Lupeo* (Makkink): Alex Humet ankoraŭ ne finpretigis sian liston kun komentoj, sed intencas fari tion baldaŭ.
- *Grammaire ABC d'Esperanto* estas kompostata kaj reviziata.
- *Omaĝlibro pri Kalocsay:* Ankoraŭ verkata. La eldono estas antaŭvidita por 1990 aŭ 1991.
- *Renardo la Vulpo*: Petro de Smedt planas baldaŭ ekkomposti.

Pluraj estraranoj atentigas, ke pli kaj pli venas protestoj kontraŭ la fakto, ke FEL eldonis librojn en kiuj aperas neologismoj. Kelkaj membroj de la klubo "Stafeto" eksiĝis pro tio kaj aliaj klientoj anoncis ke ili ne plu aĉetos ĉe FEL. Post iom da priparolado estas decidite, ke FEL ne plu eldonos librojn kun neologismoj.

3. **Lingvo-borso en Bruselo**: Por iom limigi la elspezojn post la malfavora financa jaro 1988, estas decidite ke FEL ne subvencios per mono la standon de la Bruselo grupo en la Lingvo-Borso. FEL tamen daŭre liveros senpagan nederlandlingvan informmaterialon.

4. **Telefakso**: Roland Rotsaert opinias, ke FEL devus aĉeti telefakson, ĉefe por faciligi la interrilatojn kun Stefan Maul kaj aliaj kunlaborantoj de Monato. Laŭ Paul Peeraerts telefakso efektive faciligus tiujn rilatojn, sed li ne kredas, ke la investo valorus. La avantaĝo estus pli rapidigo de la eldonprocezo de Monato per 3-4 tagoj, sed ĉu tio valoras investon de cent mil frankoj plus la pli altajn telefonkostojn? Roland opinias, ke devus esti ebla ricevi senpagan telefakson, ev. interŝanĝe kun anoncospaco. Li plu esploros.

5. **Antaŭa protokolo**: Akceptita.

6. **FEL-kongreso en Gent**: Financaj rezultoj ankoraŭ ne alvenis.

7. **Jarkunsido**: Kelkaj opinias, ke la jarkunsido estas tro teda, kaj ne allogas novajn membrojn. Post iom da interparolado oni konsentas pri la jena skemo por 1989, kondiĉe ke ĉiuj, precipe la oficistoj de la oficejo, pretas kunlabori: Inter la 1a kaj 3a horo posttagmezo "malfermitaj pordoj": estos malfermita daŭre la libroservo, la bufedo kaj funkcios la kutimaj servoj de la centro (presmaŝino, kompostilo, komputilo ktp,) tiel ke la vizitantoj povas konkrete vidi kiel la laboroj funkcias.

Inter la 3a kaj 5a horo posttagmeze estos la oficiala parto de la

jarkunsido kun financaj rezultoj 1988, buĝeto 1989, sekretaria raporto, elekto de administrantoj, estraranoj kaj prezidanto.
En Esperanto-Panoramo, kiu laŭeble aperu la 20an de februaro, aperu alvoko por ambaŭ partoj de tiu jarkunsido de la 11a de marto.

8. **Venonta estrarkunsido** okazos en la centro la 11an de marto (antaŭ la ĝenerala jarkunsido) ekde la 8a30 por la financaj aferoj, ekde la 10a por la ĝeneralaj.

9. **Studotago pri instruado** (4a de februaro). La instruistoj ricevos/is.. specialan inviton por tiu ĉi studotago. Instruistoj kiuj pro forgeso n.. estus ricevintaj tian inviton, estas petataj anonci sian venon telefone al Alex Humet (03 239 21 69).

10. **Aliĝoj UK**: Pro miskompreno tri aliĝoj por la UK en Brighton kiuj jam okazis en 1988 (do antaŭ la prezaltiĝo) ne estis plusenditaj al UEA. La estraro decidas ke la financan perdon ne pagu la koncernitoj sed la konto turismo ĉe FEL.

11. **Korespondpetoj** kiuj alvenas en la centro estu ekde nun simple pludonataj al Alex Humet kiu traktos.

12. **Kimie Markarian** faros prelegvojaĝon tra nia lando en la lasta semajno de aprilo. Interesitaj grupoj kontaktu Hilde van Ingelgem (053 70 50 11).

---

*Ĉiuj esperantistoj estas kore invititaj viziti la Esperanto-domon en Antverpeno (Frankrijklei 140) sabaton la 11an de marto 1989. Ekde la 13a horo estos vizitebla la funkcianta kompostejo, presejo, bindejo ktp. Krome daŭre funkcios bufedo kaj viziteblos la libro-vendejo kaj ekspoziciejo.*

---